

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 77 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio. 10 novembro 1926

THE UNIVERSAL LANGUAGE & ITS NECESSITY.

The world, in this third decade of the twentieth century, offers a tragic contrast. On the one hand, material obstacles between the remotest parts of the earth are fast crumbling down. On the other, there have never been deeper chasms between race and race, or between nation and nation.

Science is universal in its principles and in its results, cosmopolitan in its personnel, international in its activities. The world is larger to-day than it was a hundred years ago, and infinitely more complex; but it is also infinitely more cohesive. The heart of Asia, Africa, South America, can now be reached in a railroad car; intelligence is flashed from continent to continent in less time than a century ago, news could be carried by the swiftest messenger to a neighbouring city. Thus the interdependence or solidarity of nations has become an actual fact rather than an ideal. Railroads, steamships, telegraphs, wireless stations, have made the whole world immediately sensitive to everything that happens anywhere on its surface: they have created a universal consciousness — the inevitable forerunner of a universal conscience.

These considerations are common-place enough: we trust that their natural consequences will seem no less obvious. We should work in the sense of this evolution and, by help-

ing it, help ourselves.... Organization for the prevention of waste and conflict, is the order of the day: and organization, to be fully efficient, must be worldwide in its scope....

Whatever your race or nationality may be, if you speak the same language, you have a bond of union, a means of approach. To speak different languages is the one impassable frontier;; You may multiply printing presses, mail service, telegraph, telephone: if the peoples do not speak the same language, these agencies are but a mockery. A common language is the one great invention that is needed to crown all the others and give them their full value....

Such a language, this must be plain at the outset, is not meant to supersede the existing national tongues, any more than the League of Nations is meant to absorb the existing rational States. Its ambition is to serve as a mere auxiliary: it will in no wise compete with French, English, German, or even Albanian in their own domains; it will not even interfere with the cultural study of foreign literatures. Artists and patriots, therefore, need entertain no fear. An auxiliary language has, for its purpose, not to suppress diversity, but to promote co-operation.

We do not wish to assert that the organization of the world depends altogether upon the adoption of an international language. By the intensive study of many modern languages

almost the same results could be attained. At the present, an idea has to pay toll at every linguistic frontier; but the most rigid policy of protection never absolutely prevents the international exchange of merchandise or the digusion of thought. Our present method is cumbersome, that is all: it is not unworkable. We shall progress, even with the curse of Babel still upon us. We would have progressed even if the printing press and the steam engine had never been invented. No single discovery is absolutely indispensable to the development of civilization. But should we deny ourselves the use of a wonderful instrument, simply because we could exist without it? Had this spirit prevailed, mankind would not even have taken the trouble of chipping flint.

The international Language problem is not a fad and not a Utopian dream: it is a fact. British and American officers during the Great War had to face it every day: at times it was pressed upon their attention with tragic insistence. Men who speak different languages have business with one another—this cannot be helped. When half a dozen Europeans, who may have been born within a hundred miles of each other, are gathered together, the difficulty arises.

The one insuperable objection to the adoption of a national language, be it French or English, is: *Designatio unius est exclusio alterius*—and cannot be done without giving offence to the majority of mankind. Even if a man were totally free from that which we glorify as patriotism (who knows it may be derided as sectionalism or parochialism within half a century), he would be placed in a position of inferiority if somebody else's mother tongue were used in international transactions. I mean physical inferiority, comparative impotency. Every one who has used a foreign language—even one he has thoroughly mastered, in presence of natives—as appreciative and kindly as you please—has felt that sense of discomfort and danger. One little slip of the tongue—and lo! there flickers that irrepressible smile. It is an unfair handicap, which will not be accepted without chafing.

If neutrality be indeed the first quality required of an international language; the chances of Greek and

Latin ought to be much better than those of French and English. Latin has no lack of supporters. There is in its favour the waning but uninterrupted tradition of two thousand years. No language is more universally studied.... The one formidable objection to the use of Latin is in its intrinsic difficulty and about that difficulty there can be no reasonable doubt.... Eight or nine years of one's life is a heavy price to pay, even for an incomparable instrument of culture; but for mere instrument of intercommunication, such a price is exorbitant and prohibitive.

There is nothing absurd or unscientific about the notion of an artificial language. As we have to combat a somewhat hasty prejudice, we may be allowed to use comparisons.... What is more natural than the growth of a plant? yet we are aware that a careful selection of seed, transplantation, fertilizers, grafting, crossing, steam-heat, are resorted to in order to reach the best results—best, that is, from the human point of view. May we not say that our fairest flowers, our most delicate fruits are artificial, exactly in the same way as the best auxiliary languages, which are also compounded of elements selected from nature, and mixed together in a natural way.

A. L. GUERARD.

(from *A Short History of the International Language Movement*).

NOW IN STOCK.

THE BIBLE IN ESPERANTO.

Every Esperantist should have a copy. This is Zamenhof's Translation of the Old Testament that has been so eagerly awaited. With it is bound the New Testament. Prices:—Ordinary paper, cloth binding, 7/6; India paper, cloth binding, 10/-; Morocco binding, 15/-; Persian Yapp, 25/-; postage extra.

Melbourne Esperanto Society. Box 731f, Elizabeth St. P.O., Melbourne.

ERARO.

Mario.. —Amio bedaŭras ke ŝi portis la ringon, kiun ŝi ricevis de Georgo, al la juvelisto por pridemandi ĝian valoron.

Klaro.. Kial?

Mario.. —La juvelisto reprenis ĝin. Li diris, ke Georgo ne revenis por saldi la konton, kiel li promesis.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimato amiko,

Jen kelkaj novaĵoj, kiuj eble interesos vin. Sabaton vespere la 25 septembro estis granda ekscito inter la sportemuloj ĉe Melbourne, kiam sinjoro Ted Thye (Usonano) la mond-majstro de la luktistoj, (kiuj devas pezi ne pli ol 175 funtojn luktis kontraŭ sinjoro Sam Clapham la majstra luktisto de la Brita Imperio por la mondmaistreco; pli ol 10,000 personoj vidis la lukton, kaj la luktejo estis ja homplena; post 111 minutoj da energiega luktado, la Anglo sukcesis levi la Usonanon kaj ĵeti lin sur la maton, surfalis sur lin kaj premadis liajn ŝultrojn dum tri sekundoj sur la maton kaj venkis. La ĉeestantaro korege aplaŭdis la venkinton, kaj ankaŭ multego da homoj, kiuj ne povis ĉeesti, ĉar oni lerte brodkastis detale la luktagon. Laŭ la insista postulo de Thye, kiu volis oportunojn por regajnisian titolon, la paro ree luktis la 16 oktobro kaj la Brito ankoraŭfoje estis la venkinto.

De la 17 ĝis 25 septembro okazis la Viktoria Agrikultura Ekspozicio. La vetero dum la naŭ tagoj estis bela, kaj en tiu tempo 231,808 personoj ĉeestis ĝin: ĉiu konsentas, ke la ekspozicio estis granda sukceso, kaj oni rimarkis, ke la nombro da ĉevaloj estis malpli multa, kaj la nombro da aŭtomobiloj pli multa ol en antaŭaj jaroj.

Unu el la plej ambiciaj taskoj entreprenitaj en limigita tempo dum la rekonstruado de la Casino-Grafton fervojo en Nova Suda Kimrujo estis la forigo kaj rekonstruo de la viadukto ĉe Clearfield. Tuj post pasagera vagonaro transiris la malnovan viadukton, komencis la laboro forigi ĝin. En malpli ol unu horo la malnova ligna konstruaĵo estis disbatita, kaj ok arkaĵoj de la nova viadukton ĝuste lokitaj. Ses aroj da laboristoj en tute 70 viroj, prilaboris la viadukton, kiu estas longa je 438 futoj, kaj pezas pli ol cent tunojn. En 24 horoj la viadukto estis finkonstruita, kaj preta por la transveturado. Kio superis la rekordon en Nova Suda Kimrujo por fervojo konstruado.

Antaŭ kelke da tagoj sinjoro Black, kiu sin okupas per la kolektado da santallignon en preskaŭ nekonata regiono proksime al Southern Cross, (Suda Kruco) en Okcidenta Aŭstralio,

deponis peton ĉe la departmento de minejoj por ricevi rekompence orhavan terpecon en neproklamita regiono, ĉar li estis la unua trovanto. Tuj kiam la novaĵo disvastiĝis, multe da petoj estis ricevitaj ĉe la mineja oficejo por lukontrakti la ĉirkaŭan teron Malsimile al antaŭaj tagoj, kiam oni devis porti la provizaĵojn sur la dorso, kaj marŝi longajn distancojn, hodiaŭ la alkuro estas per aŭtomobiloj. Sinjoro Black mem havas sargaŭtomobilon, kiun li uzas por la la santalo-kolektado. Sinjoro Black diris ke la orhava tero etendiĝas norde kaj sude pli ol duonon da mejlo laŭlonge, kun meza larĝo de 440 jardoj. La trovaĵo sidas ses mejlojn okcidente de la 140 mejla fosto de la kontraŭbesteta barilo, norde de Southern Cross. Akvo estas havebla en la proksimeco en natura akvujo aŭ lago, kaj troviĝas bona vojo laŭlonge de la kontraŭbesteta barilo, sur kiu oni povas veturigi aŭtomobilon po 30 mejloj en horo.

Samtempe venas novaĵo el rivereto Eadie Creek, Nova Ginio, ke tie troviĝas multe da oro; ĉirkaŭ 40 homoj prilaboras la gruzon, kaj ĉiu ricevas almenaŭ 100 unuojn semajne. Eadie Creek sidas sur altaĵo, kie nokte homo bezonas kvar lankovrilojn por konservi la varmecon. Lastatempe oni trovis du novajn lokojn kie la gruzo estas orhava. Ĉirkaŭ 140 viroj al-bordiĝis sur la marbordon ĉe Salamoga gulfo, kiu estas la plej proksima haveno al Eadie Creek, sed ili ne povas iri al la rivereto, ĉar ne eble estas havigi portistojn. Permeso por serĉi oron kostas 50 funtojn sterlingajn, kaj oni bezonas krome ankoraŭ 300 funtojn sterlingajn, kaj ankaŭ portistojn por atingi la rivereton Eadie. Portistoj kostas 20 ĝis 50 funtojn sterlingajn, kaj ili estas preskaŭ nehavblaj. Oni povas ĉungi ilin por unu funto sterlingo krom la nutraĵo semajne kiam ili estas haveblaj.

Sinjoro Gibson la ĉefpoŝtestro de Aŭstralio, diras ke en ses monatoj Adelaide kaj Brisbane povos paroli inter si telefone, kaj ke la telefonlinio estos la plej longa en la mondo.

Pli ol cent mejlojn norde de Melbourne, en Okcidenta Aŭstralio, troviĝas stranga rivereto, nomata la "Mill Stream" (muelo-rivereto.) Ĝi eliras el la kalkŝtono, formiĝas lageton, el la lageto fluas rapide kvar mejlojn sur la supraĵo, fine ekmal-supren iras en alian lageton kaj malaperas.

Speciala eco de tiu ĉi rivereto estas, ke ĝi estas la sola en la okcidenta duono de Aŭstralio, kiu ne estas influata de la vetero. Kiom ajn varmega povas esti la vetero, aŭ kiom ajn la aliaj riveroj malpligrandigas pro pluvmanka periodo, la "Mill Stream" daŭre elverŝas 40 milionojn galonojn da akvo ĉiutage, iaŭ longe de la kvarmejlana fluadon, kaj denove eniras la sensunan maron, kiu sendube kuŝas sub tiu ĉi parto de la kontinento. La gravecon de tiuj ĉi subteraj akvoj jam rekonis la registaro, kaj aro da esplorantoj jam estas forsendita por esplori ilin, sub la kontrolo de sinjoro Lance Le Souef.

Ke ili ekzistas, jam de longe estas sciata, kaj la fakto, ke en okcidenta Kvinslando fiŝoj longaj da tri coloj jam eliris el la profundeco de 2000 fotoj, pravas la saman konkludon. La rezulton de la esploro ni atendos kun multa intereso. Via fidele, P.H.

NOVEL WEDDING.

It Was In Esperanto.
(Pictorial World Cables).

LONDON, Sunday. — For the first time in the history of the Church of England, a wedding was conducted in Esperanto at St. George's, Bloomsbury.

The bride was the talented Austrian violinist, Fraulein Schönanau. The clergyman, an Esperantist, read the service from a translated prayer-book. The responses were given in Esperanto.

Many Esperantists attended, wearing the Esperanto green star badge. The best man was the English Esperanto president. —Sun.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 5; Amikeco, 9-10; British Esperantist, 257, 258; Belga Esperantisto, 6-7; Der Arbeiter, 9; Die Einheitsfront, 32, 33, 34. Informservo de la Internacia Labora Oficejo, sept.; La Unuigita Tuthomara, sept., oct.; La Fervojisto, 9-10, 11-12; Litova Stelo, 9; Libera Laboristo, 3; La Ora Epoko, 16; Novaj Tempoj, 8-9; Oomoto, 19; Oomoto Internacia, 3-9; Portugal-Esperanto, 6; Pacifika Espero, 15; Revista del Ateneo, 25; Svenska Esperanto, 7-8.

LETERO DE VOJAGANTO.

s/s Tugela, Sur Mediteraneo,
28 de aŭgusto 1926.

Kara amiko,

Ni, s-ro Hyde kaj mi, estis feliĉaj ricevante veturon kiel vojaĝantoj sur norvega ŝipo iranta de Rabaul al Marseilles. La 29 junon ni lasis Rabaul — kaj ankoraŭ estas inter Italio kaj Sardinio. La unua semajno sur la Pacifiko estis sukcesa: la vivado sur la ŝipo komforta por ni, en kelkaj rilatoj eĉ luksa. Sed tiel ne restis longe: vespere la 6 julio, kiam ni kun la kapitano kaj telegrafisto, ludis "Kvincenton" sur la ferdeko, ni aŭdis subite signalilon soni, kaj tuj poste pomm pamm krrr — sekvis peza silento. Ni trafis koral-rifon en mezo de la Pacifiko. La rifo estis pli granda ol oni sciis kaj kelkajn mejlojn for de sia surkarto montrita loko — jen la kaŭzo.

Tiam sekvis labortagoj: kvin tagoj ni transportis sargon de la antaŭa parto al la posta kaj eĉ ĵetis kelkajn centojn da tunoj en la maron. Inter tempe holanda ŝipo venis helpi nin, sed povis fari nenion. Fine ni liberiĝis sen iu helpo. Tio okazis dimanĉmatene, sed malgraŭ tio ni trinkis botelon da ĉampano!

Kauze de tiu kelktaga penado sur la rifo nia karbo elkonsumiĝis, kaj ni devis veturi en Labuan, ĉe la okcidenta bordo de Borneo, kie tamen pro malbonaj tempoj estis venia karbo. Do ni devis atendi ses tagojn ĝis oni portis karbon el Sandakan, ĉe la orienta bordo. Post tio ni iris en Singapore, kie ni pasigis du intereso-plenajn tagojn.

Tiam sekvis trisemajna batalo kontraŭ okcidenta monsono sur la Hinda Oceano. Dum la tuta tempo mi havis malagrablan dentodoloron, kio certe ne plibriligis la ventegajn tagojn. Fine ni atingis Perim, ĉe la malfermo de la Ruĝa Maro. Se vi iam estis tie, vi sendube samopinias kun mi pri tio, ke ĝi estas la plej mizera loko sur la tero: eĉ ne guto da akvo, eĉ ne koloro de kreskaĵo, nur suno kaj ŝtono. Tiam ni venis al Suez kaj Port Said, kaj lastan nokton ni trairis la markolon de Messina en brila lunumo. Post tri tagoj ni estos en Marseilles, de kie mi iros al Paris, London, Hull, Helsinki kaj hejmo.

Sincere via LAURI LAIHO.

KRONIKO.

MELBURN. V. — Dum la pasintaj du-tri monatoj, kelkaj ekskursoj estis aranĝitaj, kaj tiu kiu okazis dum la monato oktobro, estis granda sukceso. La ekskursanoj ekiris de Kew, la rendevuo, kaj marŝis tra la kampoj ĝis la rivero Yarra kie nova ponto estas antaŭ ne longe konstruita. Post mallonga ĉirkaŭrigardo la anoj daŭrigis la marŝadon inter la "Feinaj Montetoj," de kiu altaĵo ili vidis belan valon tra kiu la rivero serpentumis kaj briletis en la sunlumo. Poste ili atingis la malnovan urbon Heideberg, kaj revenis hejmen per vagonaro, post tre ĝuebla posttagmezo. Okazis dum la monato, traduka rondo, kaj ĉiu ano ricevis unu paragrafon de fabelo, kaj poste legis la tradukitan pecon laŭ ĝusta ordo. — La debato "Ĉu oni permesu al la Leĝo la rajton reguli la modojn?" estis bona sukceso, kaj elvokis multajn amuzajn opiniojn.

SYDNEY. — Sur unua paĝo, sub rubriko "En Esperanto — Unika Edziĝo" vesperjurnalo "The Sun," lastmonate publikigis depeŝon pri tutesperanta edziĝceremonio en Londono. Aperas, ke talenta aŭstria violonistino, F-ino Schonau, edziĝis en anglikana preĝejo, kie la pastro estas esperantisto. Portante verdajn stelojn la gastoj alveturis en omnibusoj kaj aŭdis esperantlingvan diservon, kiel ankaŭ la respondojn faritajn en Esperanto.

Kiel propaganda materialo tiu estas bonvenata, certe multaj el la tagjurnala legantaro atentigis al nia afero, sed ĝuste tia novaĵo postlasas la ideon, ke Esperanto ankoraŭ estas "unika" kaj apartenas al stranga sektio. Kial serioza, edukinda informo pri universalaj kongresoj, gravaj decidoj kaj progres-raportoj ne povas esti kablita de tempo al tempo, estas malfacile kompreni. Ŝajnas, ke oni evitas tian klerigan novaĵon. Plenaj dektri monatoj forpasis de kiam iuj el niaj ses Sidnejoj tagjurnaloj enhavis ian kablitan aludon al Esperanto. Kiel necesa estas la gazetarservado de lokaj grupoj en Aŭstralio!

Post trimonata seninterrompa instruado, la esperanta kurso por komencantoj ĉesis ĉe 2KY Radio Stacio. Je la lasta tiurilata disaŭdigado, kiu okazis la 19a. oktobro, la administracio aere dankis la gvidanton, s-ro F. T. Simon, kaj konstatis sian tutan kontentigon pri la sukceso de tiu eksperimento esperante, ke alia kurso baldaŭ sekvos. S-ro Simon tiam anoncis, ke li aranĝos duan kurson por la fino de somero.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — S-ro R. J. Grago daŭras brodkasti pri Esperanto de sendstacio 1YA; li parolas dume ĉiudusemajne sabatojn je 7.30 ĝis 7.45 vespere.

La anaro de la Remuera Klubo nombras tridek kvin; f-ino Joyce Dewing (ĉe 5 Aldred Road) estas la nuna sekretarino.

Bonega informo raporto rilate la

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

Tasmanio estas laŭ ĉiu opinio tre bona loko en kiu oni libertempas.

Dum pasko 1927 estos plia alogilo—Esperanto Kongreso.

Venu ni vokas vin.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezfacila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

18an Esperanto — Kongreson estas publikigita en la Aucklanda gazeto — "The N.Z. Pictorial News."

The Nov-Zelanda delegito al la 18a Kongreso (s-ro S. Andrew, el Feilding) entuziasme raportis pri sia agado kongresa al la Aucklanda Esperantista Asocio, samtempe sciigante ke li spertis nenian malfacilaĵon.

MANGAHAO—HYDRO, N.Z. — Pro translokigo de kelkaj klasanoj, la klaso iom suferis, sed la gvidantoj atendas la kreskon de la radikoj, la semojn de kiuj ili mem unue enplantis.

WELLINGTON, N.Z. — De post la aperigo de la nomo de la delegito kaj vic-delegito de U.E.A. en "Esperanto" kaj la Oficiala Jarlibro, la laboro de tiuj sinjoroj plimultiĝis. Estas rotinde ke la surskriboj en la nomo de la Asocio plifortigas kaj plifaciligas la lingvan laboron, kaj havigas pli da atento kaj respekto de ĵurnalistoj.

Vizitantoj al tiu—ĉi urbo dum oktobro estis: F-ino Anderson (Melbourne); rusa sinjorino (nomo ne konata); s-ino Watkins (Auckland); kaj s-ro J. McGuigan, (Mangahao-Hydro).

La N.Z. sekretario de la Hobarta (A.E.A.) Kongreso, (s-ro Wm. H. King, Postal Division, Secretary's Office, G.P.O., Wellington) raportas ke multaj malavaraĵoj jam atingis lin; sed li deziras doni al la Nov-Zelanda legataro de la Suda Krucio rememorigon pri tiu—ĉi afero.

Sesa parolado, kio konsistis el detaloj koncerne la 18an Kongreson; okazis je 7a oktobro de sendstacio 2YK.

FEILDING, N.Z. — La Esperanto kurso finiĝis dum septembro; la meznombra ĉeesto de lernantoj dum la sesmonatoj estis dekdu; la progreso farita de la kursanoj estis kontentiga, kelkaj el ili nun korespondas kun alilandaj samideanoj. Espereble, la nova sesmonata kurso komencos dum aprilo, 1927. S-ro R. Ross (Box 116, Feilding) estas la gvidanto.

La U.E.A. nun havas delegiton kaj vic-delegiton en tiu—ĉi distrikto; la ofico estas okupataj de s-roj Ross kaj A. Willimasón respektive.

ESPERANTO AND TELEGRAMS.

It is somewhat difficult to understand the reasoning of the official mind. The authorities have wisely declared Esperanto to be a "clear"

language; that is to say, it may be used for telegraphic purposes. Until recently Esperanto came under the head of a code, and as such was charged for at code rates. But although Esperanto is placed on the same footing as other languages for transmission by telegraph to distant nations, it is not permitted to be used in the same manner for transmission in Australia. Esperanto is a simple easy auxiliary language, it is used by people of all nations and is a necessary medium of communication between people of all colours, creeds and politics. Many migrants from Europe find Esperanto most useful on arrival in this country. To them the English language is difficult and Esperanto is the bridge by which they cross from their mother tongue to our own. While acquiring a working knowledge of English the migrant merchant or manufacturer from say Czecho-Slavia, with his ability to use fluently the international language, can carry on quite successfully any business which he may undertake. He may send telegrams in Esperanto to any of the various countries throughout the world, but if he desires to send a telegram from Melbourne to Brisbane he finds that the law says "no." If Esperanto be used in a telegram to any place in Australia the postal regulations say that the sender must pay code rates. Surely this is the last word in absurd regulations. Thousands of people in Australia speak, read and write Esperanto in addition to their mother tongue. To them it is a language as French or German is. Yet one may send a telegram in these latter languages, but not in Esperanto. Why not? Perhaps some of our progressive legislators will move in the matter?

TEXTBOOK SCARCITY.

Supplies Now Available.

A large Consignment of Fryer's "ESPERANTO TEACHER" just landed. Thirteenth Revised Edition.

Used at 2KY Wireless Station, Sydney.

Societies, Clubs, Groups or Individuals can obtain immediate supplies in any quantity from

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY,
Box 271, G.P.O. SYDNEY.
Cut-rate Prices. Prompt Delivery.

RECENZEJO.

De la eldonisto Higgie kaj Kompanio, el Skotlando ni ricevis malgrandan libron, pri Belega Skotlando, kaj ilustritan libreton, kiu montras la vidindaĵojn en la diversaj partoj de Bela Skotlando. La enhavo de la malgranda libro estas presata en Esperanto. La aŭtoro skribis pri la riveroj, lagoj, montoj, kaj antikvaĵoj, ktp.

La ilustrita Libreto estas bele presita kaj montras bildojn de la la plej belaj konstruaĵojn malnovaj kaj novaj, rivero Clyde, golfeto Rothesay, kaj multaj aliaj vidindaĵoj. La plej multe el kiuj estas konataj de mi, la skribinto. La tuta enhavo de la du libretoj taŭgas kiel memoraĵon de la 18a en Edinburgo.—(J.S.)

PALACO DE DANGERO, Rakonto pri Madame la Pompadour. Mabel Wagnalls, tradukis el la angla originalo, Edward S. Payson, Honora Prezidanto de la Esperanto Asocio de Nordameriko. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. 206 paĝoj, lukse tollindita. Prezo 68 0d.

Mabel Wagnalls, (Sinjorino Richard Jones), estas Usona verkistino kaj devus esti bone konata de la ĉiulanda Esperantistaro pro ŝia verko, "La Rozujo Ĝiumiljara," ankaŭ majstre tradukita de s-ro Payson. "Palaco de Dangero" estas tre alloga rakonto pri la tempo kaj moroj de Ludoviko XVa de Francujo. Estas priskriboj de romanecejaj aventuroj, de okaziintaĵoj ĉe la Reĝa Korto, kaj vortbiloj de la Reĝo, de lia favoratino, Madame Pompadour, Voltaire kaj aliaj tiutempaj famuloj. Samtempe la fadeneto de Carma amrakonto estas interplektita tiel simpatie, ke oni finas la legadon de la romano kun sopireto de vera bedaŭro. La stilo de s-ro Payson estas facila, gracia kaj belu kaj la rezultaj novaj vertoj enkondukitaj estas—almenaŭ por Angloj—tuj rekoneblaj. La libro estas bone presita, sur bonkvalita papero kaj estas forte kaj lukse tollindita. Mi rimarkis unu—sed nur unu—presaron. —(C.W.B.)

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO, de D-ro Benson, Benson School of Esperanto, Newark, N.J., U.S.A. Prezo po 25 cendoj por leciono.

La unua kvar lecionoj eldoniĝis. La kurso entreprenadas la instruon de Esperanto en dudek lecionoj nur per bildoj, el kiuj troviĝas en ĉiu leciono

tracent, kaj Esperanta klarigo. La antaŭparolo kaj instrukcioj pri uzmaniero estas presitaj en la propra lingvo de la lernato. Por meminstruo la kurso ŝajnas tre taŭga. Sendube D-ro Benson havas senlimam fidon pri la rezultatoj de la kurso, alie li ne elspezus la grandan monsumon necesan por la pretigo de la kurso. Kun li, mi ankaŭ atendas neordinaran sukceson.—(C.W.B.)

NINETEENTH AMERICAN CONGRESS.

This was held at Philadelphia from 20th to 26th July. The full report in the American Esperantist is informative of the go-ahead methods of the North American Esperanto Association, and from it the following extracts are summarised.

Dr. K. Ossaka, who is visiting America to study railway matters on behalf of the Japanese Government, referred to the tremendous growth of Esperanto in Japan and mentioned that the Society to which he belonged had over 2500 members!

Dr. Ernst Kliemke, a visitor from Berlin, (under whose guidance Rudolf Mosse and Co. are issuing "Biblioteko Tutmonda"), referred to the great need of an auxiliary language in Germany where, as is not generally known, 1200 languages are spoken.

Mr. Kosminski, Cleveland, told the Congress that as U.E.A. delegate he had received orders for so many things that he had formed the "Cleveland Esperanto Import Export Company."

A new course of Esperanto by radio is being given from Gimbel Studio, which has always been sympathetic to Esperanto, by Miss Helen Eaton, who conducts an Esperanto class at Columbia University.

The annual salary of the Secretary of the North American Esperanto Association has been fixed at 1200 dollars for the ensuing year!

It is intended to arrange personally conducted tours to Europe, to be known as "World Acquaintance Tours." Those planning to join a tour will previously take a course of Esperanto and become familiar with the Esperanto movement. U.E.A. will put tourists in touch with Esperanto societies and furnish guides.

NEKROLOGO.

Sinjoro Pastro Geo. Aldridge.

Ne nur la Esperantistaro de Aŭstralazio, sed ankaŭ multaj samideanoj en diversaj partoj de la mondo, kun granda kaj sincera bedaŭro sciigos pri la morto, ĉe Aŭklando, Nov-Zelanda, de sinjoro pastro Georgo Aldridge, Kunulo de la Brita Esperantista Asocio.

Aŭtomobilo frapis S-ron Aldridge, kiu mortigis je la dekdoua de oktobro, pro la vundoj kiujn li ricevis.

S-ro Aldridge, kin estis sepdekdujaraĝa, estis unu el al plej fruaj kaj plej famaj pioniroj de la lingvo en Nov-Zelando, farinte multe de bonega pionira laboro. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la unua Nov-Zelanda Esperantista Asocio kiun asocion li helpis fondi. Bedaŭrinde, sed kiel en multaj aliaj landoj, la milito nuligis multe da lia laboro, sed spite de tio, estas fakte ke S-ro Aldridge ĝis tiam instruis pli ol du cent personojn. Sen ia dubo, la nenatura morto de tiu-ĉi amiko de Esperanto estis tre severa frapo al nia movado en Nov-Zelando.

La simpatio de la Nov-Zelanda Esperantistaro estas elkore etendata al la parencoj.

LA DEDIĈO DE LA BIBLIO

ĉe St. Giles Katredralo, Edinburgo.

Er la nomo de la eklezio de Jesuo Kristo ni ricevas ĉi tiun libron kun danko, kaj en la nomo de la Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito ni dediĉas ĝin al la Gloro de Dio kaj la Servo de homoj. Amen.

NI PREGU.

Nia Dio kaj Patro en la Ĉielo, la donanto de ĉiu bona kaj perfekta konaco, ni dankas Vin pro Via Sankta Vorto. Via Vorto simile al Vi mem estas eterna, "La herbo velkas kaj la floro defalas, sed la Vorto de Dio daŭras eterne."

Speciale, nuntempe, ni benas Vian Nomon pro la Malnova Testamento, pro la historio de Via popolo, pro

homoj de antikvaj tempoj, inspiritaj kaj ebligataj de Via Spirito malkaŝi Vian menson kaj volon, kaj konduki Vian popolon al pli plena sciado de Vi kaj al pli sankta vivo.

Pro la laboroj de Viaj servantoj per kiuj ĉi tiu libro estas tradukita en la Lingvo Internacia, la lingvo de Espero kaj Amo, ni benas Vian Nomon, Sinjoro Dio, lasu Vian benon fali sur ĉi tiun libron.

Pardonu al ni ĉar ni Viaj servantoj jam uzis ĝin tiel malmulte. Helpu nin studi ĝin pli diligente pli fidele. Malfermigu niajn okulojn por ke ni povas vidi mirindaĵojn en Via leĝo.

Precipe antaŭ ĉio ebligu nin tiel legi ke ni povas vidi kaj trovi Lin kiu estas la Vojo, la Vero, kaj la Vivo.

Kaj al Vi Patro, Filo kaj Spirito estu la gloro, nun kaj ĉiam, Amen.

—el La Kolportisto.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je ia oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Bvatt, Sekretario: f-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW." Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.